# Esperanto en Belgio 2024 - jarraporto




© bildo: Internacia Esperanto-Instituto

esperanto Belgio

# Enhavo

**Enkonduko....3**
**La agado de esperantistoj en Belgio en 2024....3**
Januaro....3
Februaro....4
Marto....4
Aprilo....4
Majo....8
Junio....10
Julio....11
Aŭgusto....13
Septembro....13
Oktobro....15
Novembro....17
Decembro....18
**Belga Esperanto-Federacio kaj UEA....21**
La estraro de BEF....21
Komitatanoj de UEA....22
Delegitoj de UEA....22
**Belgaj asocioj kaj lokaj grupoj....23**
Flandrio: Flandra Esperanto-Ligo (FEL)....23
La estraro de FEL....24
Lokaj grupoj de FEL....25
Bruselo: Esperantista Bruselo Grupo (EBG)....26
Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o)....27
La estraro de V.Esp-o....27
Lokaj grupoj de V.Esp-o....27
Asocioj aktivaj en Belgio....29
Movado sen Nomo....29
Verdaj Skoltoj: niaj junuloj....29
Eldonejo Libera....29
BAFE - fervojistoj....30
BEMI - biciklistoj....30
ILEI - instruistoj....30
IESPA - arkivo....30
TEVA - vegetaranoj....31
**Konkludo....31**

# Enkonduko

La estraro de Belga Esperanto-Federacio volas per jarraporto doni superrigardon de la ĉefaj Esperanto-agadoj en Belgio. Belgaj esperantistoj estas aktivaj, sed la aktivuloj en la diversaj regionoj de nia lando ne ĉiam scias unu de la aliaj pri la planoj kaj realigoj de kluboj kaj unuopuloj. Ĉi tiu raporto celas konigi la agadon de esperantistoj en Belgio, ankaŭ al interesitoj ekster nia lando, kiel la estraroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj asocioj en najbaraj landoj. Kvankam la raporto ne estas kompleta (nek celas esti), ĝi donas tamen ideon de la kvanto kaj diverseco de nia agado.

Ĉi tiu jarraporto estas publika. Verkis ĝin Yves Nevelsteen.

# La agado de esperantistoj en Belgio en 2024

Jen monata superrigardo de eventoj kiuj okazis en Belgio en 2024. Informoj estas ĉerpitaj de interalie Eventa Servo, de belgaj Esperanto-revuoj kaj de la Beneluksa Bitarkivo.

## Januaro

### Novjaraj renkontiĝoj

Tradicie, belgaj esperantistoj kune festas novjaron dum renkontiĝo en Germanio. Pluraj junuloj iris al **Junulara Esperanto-semajno** (JES) https://eventaservo.org/e/5e7318 en Storkow. Familioj iris al **Novjara Renkontiĝo** (NR) de la asocio EsperantoLand en Wiesbaden https://eventaservo.org/e/559e0f. **Luminesk'**, alia novjara renkontiĝo, okazis sur Norderney, la dua plej granda insulo de la Orientfrisaj insuloj.
https://eventaservo.org/e/e8f972




### 100-jarigo de Grégoire Maertens

La numero 323 de Horizon-taal (novembro-decembro 2023) estis plejparte dediĉita al Grégoire Maertens, kiu fariĝis 100-jara la 1-an de januaro 2024. Vi povas senpage legi tiun numeron en la reta arkivo de Horizon-taal https://mallonge.net/hor-arkivo. Pli novaj numeroj de la revuo estas nur konsulteblaj se vi estas membro de FEL.

Okazis festo en Bruĝo okaze de la 100-jariĝo de Grégoire Maertens kaj UEA starigis la **premion Grégoire Maertens**, aljuĝota ĉiujare al organizaĵo aŭ esperantisto, kiu aparte kontribuis aŭ kontribuas al la progreso de la movado por Esperanto kaj rilataj agadoj.

## Februaro

### Lingva kafejo Mundial 13/02

En februaro partoprenis esperantistoj en paroliga rondo Lingva kafejo Mundial en Gento. Ĝi regule okazas. Serĉu en Eventa Servo per https://mallonge.net/mundial por novaj datoj.



## Marto

### Promenado: Loveno en la Mezepoko 10/03

La 10-a de marto la loka grupo Esperanto 3000 organizis promenadon tra Loveno kun oficiala ĉiĉerono de la asocio *Lots of Leuven*. Ria Van den Broeck rakontis al dudeko da partoprenantoj pri Loveno en la 12-15-a jarcento. Regis tre agrabla etoso.
Raporto kun fotoj: https://mallonge.net/mezepoko24

## Aprilo

### La Esperanto-arkivo trovis domon!

La ĉefa novaĵo de aprilo 2024 estas, ke la asocio IEspA sukcesis akiri domon en la centro de Diest. IEspA baldaŭ havos arkivkonstruaĵon sur la teretaĝo kaj kelo de pli ol 350 m². Grave: forluante la apartamenton en la unua etaĝo ili povos kovri la kurantajn kostojn!
http://www.iespa.eu/

Eĉ aperis artikolo pri la arkivejo en la flandra gazetaro VRTNWS.
https://mallonge.net/iespa-vrt




Studosemajnfino en Nederlando 12-14/04

Dufoje jare okazas en Nederlando studosemajnfino. Regule partoprenas belgoj, ĉu por lerni, ĉu por instrui Esperanton. https://esperanto-nederland.nl/studieweekend

**Johan Van Eenoo** partoprenis kun kelkaj siaj lernantoj el Bruĝo en la studosemajnfino en aprilo 2024. **Yves Nevelsteen kaj André Staes** tiam instruis tie. Yves dum paŭzoj organizis etan libroservon. https://benelukso.eu/2024-04-studosemajnfino-en-nederlando/



## Esperanto-junulara Bruselumado 12/04

La 12-an de aprilo okazis en Bruselo la unua junula bruselumado. Okaze de renkonto de junuloj en la Eŭropa Parlemento, junuloj de tuta Eŭropo kunvenis en Bruselo kaj spertis diskejan glitkuradon kaj baratan manĝaĵon. Vi povas legi pri la evento en https://eventaservo.org/e/01bae1. Aperas tie ankaŭ kelkaj fotoj kiuj donas impreson pri la etoso.



## Tago de la Flandraj Ardenoj 14/04

Ĉiujare la flandra naturasocio Natuurpunt organizas Tagon de la Flandraj Ardenoj. Dum tiu tago la lokaj naturasocioj montras siajn Flandrajn Ardenojn en printempaj vestaĵoj. Estas jam longa tradicio ke ankaŭ esperantistoj partoprenas. En aprilo 2024 la evento okazis en Brakel; **la Esperantoparton organizis Piet Glorieux** nome de la loka grupo La Konkordo. https://eventaservo.org/e/fa2024

## Kunveno de KLUBo: la plej belaj lipharoj 27/04

La 27-an de aprilo okazis en Bruselo la konkurso de la plej belaj lipharoj. Kresko (Adam Brooking) partoprenis kaj la membroj de KLUBo venis festi kune. KLUBo, la Klubo de la Liberaj Universitatoj de Bruselo estas la Klubo de studentoj en Université Libre de Bruxelles kaj Vrij Universiteit van Brussel, sed ĝenerale de junuloj en Bruselo. La KLUBanoj renkontas kelkfoje jare, foje por partopreni en kulturaj eventoj, foje por babili en Esperanto.

## Limburga Tago 28/04

Esperanto Limburg invitis nin esplori la urbon Gruitrode, la urbo kie vivis Phil Bosmans, la kreinto de "Movado sen Nomo". https://eventaservo.org/e/59ca77. Raporto kun fotoj: https://mallonge.net/lt24-bitarkivo





## Majo

### Eŭropa Kongreso 08-12/05

La Eŭropa Kongreso okazis de la 8a ĝis la 12a de majo 2024 en Strasburgo. Belga Esperanto-Federacio estis oficiala partnero.https://kongreso2024.esperanto-france.org/

Germana Esperanto Asocio (GEA) kaj Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) decidis kune kongresi en 2024 en Strasburgo. Sed ĉar Strasburgo estas ankaŭ unu el la ĉefurboj de Eŭropaj instancoj, la organizantoj decidis pligrandigi la kongreson invitante aliajn landajn asociojn de Eŭropo por ke estu vera Eŭropa Kongreso! Ankaŭ kune kongresis IFEF (fervojistoj), IEF (italoj), BEF (belgoj), SES (svisoj).

La Verdaj Skoltoj okazigis dum la Eŭropa Kongreso **skoltumadon por junuloj**, homoj inter 8 kaj 21 jaroj. Ili tendumis en la tendumejo de Strasburgo, vizitis la urbon kaj faris aktivaĵojn aparte de la Eŭropa Kongreso. Estis 27 partoprenantoj: 8 estroj, 5 lupidoj, 8 esploristoj kaj 4 ĉin-germanaj adoleskuloj kiuj vizitis kun 2 akompanantoj. Jen vi trovos pli da informoj: http://verdajskoltoj.net/strasburgo/ kaj https://eventaservo.org/e/tendumaro-VS-2024



Post la kongreso okazis Estra Semajnfino en Strasburgo. La Verdaj Skoltoj preparis tiam tie la sekvontajn eventojn, kaj konceptis la novan grupon: Roveroj.

### Ekskurso de La Erikejo

Jara ekskurso de la nordkampina grupo La Erikejo al promenloko trans la belga landlimo okazis la 23-an de majo. La gvidisto Rien Slagter surprizis la partoprenantojn per promenado je sia preferata promenloko *De Zanderijen* inter Heerle kaj Bergen op Zoom. https://eventaservo.org/e/48262f

Ampleksa raporto aperis en Horizon-taal 328 septembro-oktobro 2024.



## Prelego pri gekurdoj en Loveno 26/05

Post komuna manĝo prelegis Viviane Tits el Tilff kun Jens, la ĉefo de Serhildan en Lieĝo. La temo de la prelego estis ‘La batalo de Kobamé kontraŭ la Islama Ŝtato‘. La prelego okazis dulingve en Esperanto kaj la franca, ĉar ĉeestis komencantoj kiuj ankoraŭ ne sufiĉe bone regis Esperanton por kompreni kion rakontis la prelegantoj. Partoprenis pli ol 10 homoj; oni venis de for. Eĉ ĉeestis esperantisto el Kolonjo.

La Powerpoint-prezenton de la prelego eblas elŝuti de https://mallonge.net/24kurdoj



### Kurso en Huy 30/05

Regule okazas Esperantokurso en Huy en la Université du Temps Disponible. Loka aktivulo estas **Philippe Draize.** Instruis en 2024 laŭvice **Eric Nemes**, **Eliane Pironnet kaj Jean Annet**. Yves Nevelsteen en majo gastinstruis unufoje. Okazis tiam libroservo.

## Junio

### Boatekskurso en la haveno de Gento 01/06

Ĉiujara ekskurso, kiu celas ankaŭ amikojn kaj simpatiantojn, kiuj (ankoraŭ) ne parolas Esperanton. La estraro de La Progreso elektis okazigi duontagan vojaĝon: boatekskurso tra la haveno kun klarigo pri kiel la haveno funkcias. Estis unika sperto, kiu veturigis nin tra la nederlanda-belga limo sur la 32 kilometrojn longa Gent-Terneuzen-kanalo.
https://eventaservo.org/e/f8202d

### Prezento de Esperanto en lernejo 06/06

Yves Nevelsteen prezentis Esperanton en lernejo en Melle. Jen traduko de la peto kiu venis al la Esperantogrupo de Gento: *Kiel Lingvoinstruisto ĉe Melle College, mi instruas kurson nomitan 'Project Taal' kiu povas esti kompletigita laŭdezire. Krom interŝanĝa projekto kaj pli redakta aliro, ni volas konigi studentojn (5-a grado) al ĉiaj aspektoj de (universala) lingvo, kiuj ne estas traktataj en klasiklingvaj fakoj.*

### Kultura Tago 15/06

Okazis Kultura Tago de Esperanto Nederland en Zutphen https://eventaservo.org/e/afa0e0. La temo de ĉi tiu tago estis: "Miaj revoj ĉe la horizonto", vortoj el la murpoemo de Bashar Almashaan. Yves Nevelsteen ĉeestis tie kun libroservo; aliaj belgoj ĉi-jare ne kuniris. https://benelukso.eu/kultura-tago

### Vizito de Judith Jackson kaj Martina Sachs al Antverpeno 16/06

Prelegis Judith Jackson (antaŭe Bormann) el Germanio, ni kune lunĉis kaj poste okazis distra moviĝado kun Martina Sachs el Germanio. https://eventaservo.org/e/LVS-16jun24

### Kanuado kaj Biciklado en Limburgo 23/06

Dimanĉo, la 23-a de junio en Smeermaas, Limburga Esperanto-Asocio kunvenis por ekstera aktivaĵo. Oni povis elekti: kanui aŭ bicikli ĝis Stokkem. https://eventaservo.org/e/17fc05
Fotoj: https://mallonge.net/kanuado24



## Julio

### Tendaro de la Verdaj Skoltoj 13-24/07

Valère raportis, ke estis ege bona tendumado. Estis 25 partoprenantoj, 10 tagoj, 8 naciecoj. Etaj raportoj kaj fotoj aperis en la Facebook-paĝo de la Verdaj Skoltoj https://www.facebook.com/verdajskoltoj



Detala raporto (taga raporto + fotoj) aperas en la  8-a eldono de revueto de la Verdaj Skoltoj, ‘Renato-monato. Vi povas elŝuti ĝin de https://mallonge.net/renato8

### Ekskurso kultura kaj natura en Loveno 21/7

La 21-an de julio, dum la belga nacia tago, okazis Esperanto-ekskurso kultura kaj natura en Loveno. Ni kune vizitis la muzeon Parcum, malkovris la abatejon kaj promenis ĉirkaŭ la lago de Abdij van Park. Vespere ni kune manĝis en restoracio en la urbocentro. Raporto kun fotoj: https://mallonge.net/loveno24

### Kunlaboro inter asocioj: kunveno de aktivuloj de FEL kaj V.Esp-o 24/07

La 24_an de julio 2024 en Longchamps okazis neformala kunsido de aktivuloj de Flandra Esperanto-Ligo kaj Valona Esperanto-asocio. Ĉeestis: Jean, Yves, Valère, Catherine, Johan, Piet kaj Alex. Oni diskutis interalie pri dungado de volontulo el Tuluzo kadre de Erasmus+, kreado de pli detala jarraporto pri la agado de esperantistoj en Belgio (kadre de BEF) kaj komuna stokejo de redakteblaj dosieroj de la revuoj Espéranto en Marche kaj Horizon-taal (intertempe realigita per Telegram-grupo *Horizon-taal en EEM backup*)

### Tago de Esperanto en Lieĝo 27/07

Okazis en Lieĝo turisma tago. **Ĝin organizis Eric Nemes de Espéranto Liège**. Ĉeestis 19 esperantistoj el Valonio, Flandrio kaj Germanio. Matene la partoprenintoj renkontiĝis en la “Musée de la vie Wallonne”. Tagmeze oni manĝis en la restoracio “Le Cloître”. Okaze de la evento en Lieĝo, kaj kadre de la Esperanto-tago (26/7), Eric Nemes intervjuiĝis de loka radio RCF en Lieĝo. Vi povas aŭskulti la intervjuon (podkaston) en interreto; aperas ligilo en https://mallonge.net/liego24




## Aŭgusto

### Universala Kongreso en Afriko 3-10/08

Pluraj belgaj esperantistoj iris al la kongreso kaj poste raportis pri tio en lokaj kluboj. Vidu https://benelukso.eu/belgoj-en-la-uk-en-arusha/. Konkrete:

- **Bernard-Régis Larue** prelegis 24/9 en Bruselo https://eventaservo.org/e/8102bc
- **Heidi Goes kaj Abel Massiala** faris prezenton en Gent 27/9 https://eventaservo.org/e/387270
- **Ben Indestege** rakontis en Loveno pri la UK kaj pri sia rondvojaĝo en Tanzanio 6/10 https://eventaservo.org/e/35692b

## Septembro

### Nova kurso en Namur

**Jean Annet komencis novan kurson por komencantoj ĉe l'Université Tous Âges de Namur**. Li uzas la kurslibron *Espéranto par la méthode directe* de Stano Marček.(https://mallonge.net/kurslibro24). La kurso estas sukcesa; ĝi okazas ĉiusemajne kaj regule ĉeestis 9 lernantoj. Pliaj informoj: https://www.utan.be/Liste_cours_Esperanto.php

### Nova dungito eklaboris ĉe Flandra Esperanto-Ligo

En septembro 2024 **Lode Van de Velde eklaboris ĉe FEL**. Li okupiĝas interalie pri membroadministrado, pri Monato kaj pri la libroservo de FEL. Lode estas konata flandra esperantisto, kemiisto laŭ eduko kaj pasia fotisto. Li esperantistiĝis en 1993 kaj laboris dum multaj jaroj kiel sekretario en artlernejo. Profesie li instruis Esperanton en Japanio dum 2 jaroj kaj dum diversaj malpli longaj eventoj. Lode estas eldonisto kaj verkisto. Li realigis multajn verkojn kaj gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. En Vikipedio vi povas legi pli pri li: https://eo.wikipedia.org/wiki/Lode_Van_de_Velde

## Nova kurso en Seraing 16/09

**Ĉiulunde ekde 16/09 Eric Nemes instruas** en la lernejo Athénée Royal de l'Air Pur en Seraing al 2 knabinoj 12 jaraĝaj kaj 1 plenkreskulino. Kurso de Esperanto laŭ la metodo Multlingva Akcelilo.

## Beneluksa Kongreso en Hasselt 20-22/09

La Beneluksa Kongreso estas ĉiujara evento kiun organizas laŭvice Flandra Esperanto-Ligo kaj Valona Esperanto-asocio. Malgraŭ la nomo, temas do fakte pri belga kongreso. La ĉi-jara Beneluksa kongreso okazis en Hasselt de la 20-a ĝis la 22-a de septembro. Organizis ĝin la Limburga Esperanto-asocio (LEA). **Estro de la organiza teamo estis An Olijslagers**.





La kongreso estis altnivela kaj ĝin ĉeestis multaj esperantistoj. Raportoj aperis en Horizon-taal nov-dec 2024, en Fenikso nov-dec 2024 kaj en Esperanto aktuell 2024-06. Raportoj, fotoj, listo de aliĝintoj ktp: [https://mallonge.net/bk24](https://mallonge.net/bk24)

**Piet Glorieux** instigis al varbado por Esperanto ĉirkaŭ la kongresejo en Hasselt. Paul Driezen rimarkis tion kaj alparolis **Marilyn Droog** por demandi ĉu oni povus viziti sian 99-jaran patron-esperantiston en la maljunulejo proksima. Marilyn kaj Eddy Van de Bosch kune vizitis lin.

## Oktobro

### Salon Charleroi Seniors 01/10

Kiel aliaj grupoj, Espéranto Charleroi estas membroj de "Charleroi Senior" (la maljunuloj) : la pensiuloj. Ĉiu jaro, la urbo Charleroi organizas plurajn aferojn: ekz. "la vilaĝo de la maljunuloj", kie ĉiu grupo povas prezenti sian fakon kaj la "salon Charleroi Seniors" pri la sano kaj la komforto.

### Nova artikolo en la retejo de Vrede vzw 08/10

Jam de pluraj jaroj membroj de La Progreso Gent tradukas regule artikolojn el la retejo de "Vrede" (Paco) al Esperanto. Tion ili faras interalie por montri al la organizo ke esperantistoj varme subtenas agadojn kiuj rilatas al mondpaco. https://www.vrede.be/eo

### KKPS iĝas VSKK 25-27/10

KKPS estas renkontiĝo kies nomo plurfoje ŝanĝiĝis. Temas pri junulara renkontiĝo por "klaĉi" pri la someraj okazintaĵoj. Unue ĝi estis organizita de la Flandra Esperantista Junulara Asocio (FLEJA) kaj poste de la Nederlanda Esperanto-junularo (NEJ). En 2024 organizis ĝin la **Verdaj Skoltoj!**

https://eventaservo.org/e/pskk2024




Post PSKK (Post-Somera Klaĉ-Kunveno) kaj KKPS (Klaĉ-Kunveno Post-Somera) nun okazis do VSKK (Verdaj Skoltoj Klaĉ-Kunveno)!



Dimanĉe dumtage 27/10

Proksimume unufoje monate en 2024 **la loka grupo de Antverpeno, la Verda Stelo**, organizas dimanĉajn ĉeestajn kunvenojn. Ofte oni kune manĝas supon. La ĉefa celo estas paroligi homojn. Aparte sukcesa estis la oktobra kunveno pri Petro Desmet', fama flandra esperantisto, kiu mortis la 12-an de majo 2024. Okazis la 27-an de oktobro **memoriga evento por Petro en la Esperantocentro en Antverpeno**. Oni kune memoris Petron en la klubejo per montrado de fotoj, rakontado de anekdotoj kaj interparolado pri la granda nombro de Esperanto-verkoj kiujn li realigis en sia vivo. En Horizon-taal, la revuo de Flandra Esperanto-Ligo aperis pluraj artikoloj pri Petro Desmet’. Lode Van de Velde mallonge parolis pri s-ro Desmet’ dum ĉi tiu kunveno. Vi povas legi la tekston en la memoriga paĝo https://benelukso.eu/petro-desmet/. Sur ĉi tiu memoriga arkiva paĝo aperas ankaŭ ligiloj al intervjuoj en formo de jutubaj filmetoj.



## Novembro

### Reeldono de ‘Espéranto c’est dans la poche’

*‘L’espéranto, c’est dans la poche’* estas 24-paĝa plenkolora libreto destinita al ĉiuj, kiuj volas lerni pri Esperanto. En 8 lecionoj akompanataj de korektitaj ekzercoj, vi lernos la bazojn de Esperanto kaj vi povos rapide komuniki kun Esperanto-parolantoj el la tuta mondo.

Represo de ĉi tiu libreto **en 5 000 ekzempleroj** estas mendita de Valona Esperanto-asocio. Temas pri tria eldono! https://esperanto-wallonie.be/eo/niaj-eldonoj




### Skoltestra semajnfino 15-17/11

Okazis Skoltestra Semajnfino + Ĝenerala Asembleo de la Verdaj Skoltoj en Sambreville.
Fotoj de la Verdaj Skoltoj estas videblaj ĉe Flickr: https://mallonge.net/vs-flickr
Filmetoj ĉe Jutubo: https://mallonge.net/vs-jutubo

### Excel’Langues 07-08/11

Espéranto Wallonie estis denove invitita al Excel'Langues en Tenneville (provinco de Luksemburgo) ĵaŭdon la 7-an kaj vendredon la 8-an de novembro 2024.

**Fulminstruis tie al 200 infanoj** Esperanton **Valère Doumont, Eric Nemes, Alex Humet, Jean-Pol Sparenberg, Françoise Pellegrin** kaj **Jean Annet**. Detaloj: https://benelukso.eu/excellangues/




### Domo de Mateo

Post la tragika forpaso de lia filo Mateo pro depresio en 2018, **Alex Humet** decidis fondi novan domon en Corbion, en la landlima regiono inter Belgio kaj Francio, kie homoj povas ripozi en la trankvilo kaj paco, kiujn la domo elsendas, kaj kune kunlabori. Ĝi estos malferma por esperantistoj kaj ne-esperantistoj, sed ankoraŭ devas esti pretigita kaj renovigita.

Aperis alvoko en Fenikso, la revuo de Esperanto Nederland. La laboroj komenciĝis en 2024, kaj la malfermo de “La Domo de Mateo” okazos en marto 2025. En novembro 2024 venis du volontuloj el norda Nederlando al la Domo de Mateo.

## Decembro

### Magistra tezo pri la Esperantomovado

**Tabatha Fabri**, juna nova esperantisto el Bruselo, jarfine finpretigis sian tezon pri internaciismo kaj sennaciismo en la maldekstremaj esperantistaj movadoj en Bruselo inter 1904 kaj 1972. Ŝia tezo interalie baziĝas sur konsiloj kaj atestoj de belgaj esperantistoj aktivaj en la lastaj jardekoj, kiuj kunportas siajn viziojn de la maldekstraj movadoj esperantistaj. Tri-lingvan resumon de la tezo de Tabatha vi povas elŝuti de: https://mallonge.net/tabatha-tezo

Tabatha prelegis pri la historio de politika Esperanta movado jam dum la reta evento Retoso en aprilo. Jutuban registraĵon vi povas spekti je https://mallonge.net/tabatha-prelego.

### Neformala kunveno en Loveno-la-Nova 01/12

En Loveno-la-Nova kunvenis lokaj esperantistoj kun turka junulino (ĵus alveninta en Belgio) en restoracio apud Caméo kinejo kaj poste vizitis muzeon. Estis tre interesa interparolado pri okcidenta kaj orienta kulturoj. Por ekscii pli pri la agado de esperantistoj en Loveno-la-Nova, kontaktu **Catherine Royaux**.

Tutbelga Zamenhoffesto en Lessines 14/12




La Zamenhofa Tago (15-a de decembro) estas la naskiĝtago de L. L. Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto, kaj la plej vaste celebrata festotago en Esperantujo. En tiu tago (aŭ en alia konvena semajntago ĉirkaŭ ĝi) esperantistoj tra la mondo okazigas specialajn renkontiĝojn por festi la okazon. La ideаro de Esperanto kaj la proksimeco de la Zamenhofa tago al Kristnasko instigas la kunvenintojn interŝanĝadi donacojn (prefere librojn verkitajn en Esperanto) kaj bondezirojn. Foje okazas dum tiaj kunvenoj ankaŭ prelegoj pri L. L. Zamenhof. Ekde 1927, tiu datreveno estas samtempe la Tago de la Esperanta kulturo kaj la Tago de la Esperanto-libro. [Legi pli en Vikipedio](#).

**De pluraj jaroj, belgaj Esperanto-kluboj kaj -asocioj kunlaboras por kune festi tiun tagon.** Antaŭe okazis apartaj festoj en diversaj kluboj de la lando, sed Belga Esperanto-Federacio instigas renkontiĝi pli grandnombre kun esperantistoj el tuta Belgio (kaj kun interesitaj eksterlandanoj!). Komuna fotaro, listo de aliĝintoj kaj aliaj informoj troveblas en https://benelukso.eu/zamfesto2024

**En 2024, la Tutbelga Zamenhof-festo okazis en Lessines. Organizis ĝin Jean Annet de Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o)** kun helpo de Yves Nevelsteen de Belga Esperanto-Federacio (BEF).

Junulara Esperanto-semajno 27/12 - 02/01/25






La Junulara E-Semajno (JES) estas novjara junulara esperanto-aranĝo kutime organizata de Pola Esperanto Junularo (PEJ) kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Ĝi okazas ĉiujare dum lastaj tagoj de decembro kaj unuaj tagoj de januaro, proksimume dum unu semajno, en iu loko en Meza Eŭropo. Laŭ formo, sed ne laŭ sezono, ĝi similas do al Internacia Junulara Kongreso. En 24/25 junaj belgaj esperantistoj organizis JES en lernejo kaj internulejo en Bernardfagne en Ferrières. Belgaj kunorganizantoj estis interalie **Pjotr De Mulder, Thomas Demeyere, Ben Indestege kaj Valère Doumont**.
https://mallonge.net/jes24-25

Ben alportis ampleksan FEL-libroservon al JES. Estis sep skatoloj da libroj! Tio donis al la partoprenantoj la ŝancon elekti sian preferatan libron kaj ŝpari sendokostojn. Dum JES okazis libroservo dum du tagoj; pluraj volontuloj deĵoris.

La fama (kaj profesia!) brazila muzikgrupo BaRok koncertis la 30-an de decembro dum JES. Ĉi tiu unika koncerto realiĝis dank' al la helpo de Valona Esperanto- asocio kaj **Christine Brücker** de la Verdaj Skoltoj, kiuj subtenis kaj faciligis la inviton kaj vojaĝon de la grupo el Brazilo al Eŭropo. BaRok estas pionira bando en la Esperanto-muzika scenejo, konata pro ilia unika miksaĵo de Folk Metal kaj Baroka muziko. Fondita en 2007, ili fariĝis la unua bando de potenca metalo, kiu publikigis oficialan albumon en Esperanto. La koncerto estis malfermita al ne- partoprenantoj de JES.




**Ivo Miesen** el Nederlando multe fotis dum JES. Centoj da fotoj pri la renkontiĝo aperas en la reta albumo https://mallonge.net/JES24fotoj.
Arkiva paĝo pri JES: https://benelukso.eu/jes-24-25

# Belga Esperanto-Federacio kaj UEA

Universala Esperanto-Asocio UEA
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

UEA nur rekonas landajn asociojn, ne regionajn. Belga Esperanto-Federacio (BEF) estas la Landa Asocio de UEA en Belgio, fondita en 1962. BEF estas ekde 2005 fakta asocio. BEF rolas de tiam kiel **neformala kupolo** de ĉiuj aktivuloj de la Esperanto-movado en Belgio. Pri BEF kaj ĝia historio vi povas legi en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/BEF

La estraro de BEF ekzemple decidas kun la prezidantoj de la membraj asocioj kiu organizos kie la ĉiujaran Beneluksan Kongreson (https://benelukso.eu/kongreso) kaj la Zamenhofan feston (https://benelukso.eu/zamenhof-festo). Ekde 2025 aldoniĝas al tio la kursosemajnfino BEST (http://esperanto.be/best).

En BEF membras jenaj asocioj (stato 2024):

- Flandra Esperanto-Ligo
- Valona Esperanto-asocio
- Esperantista Brusela Grupo
- Verdaj Skoltoj

Aliaj asocioj kaj individuoj kiuj aktivas en Belgio estas

- Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
- Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)
- Movado sen Nomo (MsN)
- Senlime
- Internacia Esperanto-Arkivo (IEspA)
- Belga Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj (BAFE)
- Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI)
- Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA)
- Esperanto-Numismatika Asocio

Cetere ekzistas ankaŭ

- Fonduso Instigo (Eventa Servo, Komputeko ktp)
- Beneluksa Bitarkivo
- La domo de Mateo

## La estraro de BEF

Dum la Beneluksa Kongreso en Hasselt la 21-an de septembro 2024 okazis Ĝenerala Asembleo de Belga Esperanto-Federacio. Kristin Tytgat tie prezentis la novan estraron:

**Estraro ekde 2024-10**
Prezidanto: Yves Nevelsteen

Sekretario: Jean Annet
Kasisto: Claude Glady

**Estraro 2018 - 2024**
Prezidanto: Kristin Tytgat
Vicprezidanto: Flory Witdoeckt
Sekretario kaj kasisto: Claude Glady
Estrarano: Yves Nevelsteen

## Komitatanoj de UEA

La Komitato estas la supera gvid-organo de UEA. Ĝi havas la rajton fari ĉiujn decidojn pri la direkto de la agado kaj pri unuopaj agadoj. Ĝi ankaŭ rajtas fari ĉiujn decidojn pri administrado, financaj planoj, ktp. La komitato kunsidas ĉiujare dum la Universala Kongreso kaj laboras perpoŝte dum la cetero de la jaro. La komitatanoj havas trijaran oficperiodon. https://uea.org/asocio/komitato

**Komitatano A** de UEA estas membro de komitato de UEA elektita de aliĝinta landa asocio aŭ aliĝinta faka asocio. Aliĝintaj membro-asocioj rajtas elekti unu komitatanon por ĉiu komencanta milo de membroj. Asocioj kun malpli ol 100 membroj rajtas nomumi observanton. Komitatano A por Belgio en 2024 estis **Marc Cuffez**.

**Komitatano B** reprezentas la individuajn membrojn (IM) de UEA. En 2025 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2025–2028. Parto de ĝi estos la elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto oni elektas unu komitatanon B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos kvin komitatanojn B.

**Komitatano C** de UEA estas membro de komitato de UEA elektita de komitatanoj A kaj B. Komitatanoj C estas personoj, kiuj estas elektitaj al la komitato pro siaj aparte bezonataj spertoj. Ofte komitatanoj C estas elektitaj estraranoj de UEA. Komitatanoj C povas estis maksimume 25 % el la kvanto de komitatanoj A kaj B. Du belgoj estis Komitatano C en 2024: **Eric Nemes** kaj **Rakoen Maertens**.

## Delegitoj de UEA

Delegito de UEA estas reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio. Ŝi aŭ li plenumas la servopetojn de la membroj. Listo de belgaj delegitoj aperas en https://uea.org/reto/delegitoj/belgio. Ĉefdelegito por Belgio en 2024 estis **Claude Glady**.

# Belgaj asocioj kaj lokaj grupoj

## Flandrio: Flandra Esperanto-Ligo (FEL)

Flandra Esperanto-Ligo estas la kupola Esperanto-asocio de Flandrio. Ĝia konata eldonejo interalie eldonas la **tutmondan magazinon Monato** (https://monato.be/). **Ĉefredaktoro estas Paŭl Peeraerts**. Monato ekzistas en papera kaj bita formo. Aperadis en 2024 ankaŭ voĉlegata versio en la formo MP3 en kunlaboro kun Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Paŭl Peeraerts komencis en 2020 koncize prezenti ĉiun numeron per filmeto. Ili estas spekteblaj en la jutuba kanalo de Monato https://monato.be/jutubo.











La membrogazeto de la Flandra Esperanto-Ligo nomiĝas **Horizon-Taal**. Ĝi estas precipe en la nederlanda lingvo. **Ĝia ĉefredaktoro estas Piet Glorieux**. La enpaĝigon prizorgas **Joost Vander Bauwhede** https://esperanto.be/horizontaal









## La estraro de FEL

En marto 2024 okazis Ĝenerala Asembleo de Flandra Esperanto-Ligo. Elektiĝis tie nova estraro:

**Estraro ekde 2024-04**
Prezidanto: Piet Glorieux
Sekretario: Johan Van Eenoo
Kasisto: Johan Donckerwolcke
Estraranoj: Alex Humet, Ben Indestege

**Estraro 2018 - 2024**
Prezidanto: Nicky Janssen
Vicprezidanto: Ivo Vercammen †
Sekretario: Piet Glorieux
Kasisto: Kevin De Laet
Estraranoj: Yves Nevelsteen, Johan Van Eenoo

Ĉe FEL laboras ĉi-momente **Lode Van de Velde. Gerd Jacques kaj Paul Peeraerts** laboris tie antaŭe kaj ankoraŭ multe helpas. Ilin asistas pluraj volontuloj.

La Retbutiko de FEL estis kreita la 9-an de februaro 1996 kaj sekve estas verŝajne la plej malnova funkcianta retbutiko pri Esperantaj libroj kaj diskoj. Ĝia retadreso estas https://retbutiko.be. FEL ankaŭ havas grandan fizikan librovendejon de Esperanto-libroj! Ĝia adreso estas Lange Beeldekensstraat 169 en 2060 Antverpeno (Antwerpen).



## Lokaj grupoj de FEL

### Antverpeno: La Verda Stelo

FEL-administrantoj: **Agnes Geelen** kaj **Klaas Dijkstra**. https://esperanto.be/antwerpen/ - https://eventaservo.org/o/LVS. Preskaŭ ĉiusemajne okazis altnivela programo per Zoom kunlabore kun la londona Esperanto-klubo (https://londonaesperantoklubo.com/). Multe kontribuis al la agado en 2024 en Antverpeno **Ella Strug**.

### Loveno: Esperanto 3000

FEL-administranto: **Nicky Janssen**.
Ĉefaj aktivuloj en Loveno estis en 2024 **Lode Van de Velde** kaj Yves Nevelsteen.
https://www.esperanto3000.be
https://eventaservo.org/o/EO_3000

Esperantistoj el tuta Belgio plurfoje kunvenis en la oficejo de Konsilo, firmao de **Myriam Vandersteen** kun nomo en Esperanto.




### Gento: La Progreso

FEL-administrantoj: **Katja Lődör** kaj **Hans Delnat**.
http://esperanto.be/gent

Kutime oni kunvenas en la Genta klubejo unufoje monate je vendredo. La klubaj vesperoj komenciĝas je la 20a horo. Multe agis en Gento en 2024 **Patrick Haerick**, ĉefe pri la lingvaj kafejoj.

Ankaŭ en Gento ekzistas Esperantodomo. Ĝia adreso estas Peter Benoitlaan 117 en 9050 Gentbrugge.



### Esperanto Limburg

FEL-administranto: **Henri Schutters**. Ĉefaj aktivuloj en Limburgo estis en 2024 **An Olijslagers, Ben Indestege** kaj **Emiel Vanderfeesten**.
Retejoj: https://esperanto.be/limburg kaj https://eventaservo.org/o/LEA

Regulaj kunvenoj de LEA okazis en 2024 en ĉiu lasta ĵaŭdo de la monato, de la 20-a horo ĝis proksimume la 22-a horo, en 't Poorthuis en Genk. Ĉiu merkredo matene (ne dum la lernejaj ferioj), Henri Schutters gvidis Esperantokurson en 't Poorthuis.

### Kortrijk: La Konkordo

FEL-administranto: **Lucrèce Decostere**. Ĉefaj aktivuloj de La Konkordo estis en 2024 **Piet Glorieux** kaj **Joost Van Bauwhede**
Retejoj: https://esperanto.be/kortrijk kaj https://eventaservo.org/o/La_Konkordo

### Bruĝo: Paco kaj Justeco

FEL-administranto kaj ĉefa loka aktivulo estis en 2024 **Johan van Eenoo**. Li regule instruis Esperanton en Bruĝo kaj vizitis kun kelkaj kursanoj la studosemajnfinon en Nederlando. https://esperanto.be/brugge

### Ostendo: La Konko

FEL-administranto: **Marc Cuffez**. Ĉefaj aktivuloj estis en 2024 **Flory Witdoeckt, Anne Brabant** kaj **Germain Pirlot**.
https://esperanto.be/oostende - https://eventaservo.org/o/La_Konko

### Noorderkempen: La Erikejo

FEL-administranto: **Mireille Storms**
Retejoj: https://laerikejo.wordpress.com kaj https://benelukso.eu/la-erikejo
La Esperanto-grupo La Erikejo estas malgranda grupo, kiu praktikas sian lingvon ĉiumonate. Kutime ili kunvenas en la trinkejo Heide City en Kalmthout (proksime de la stacidomo de Heide). Ĉi tio plejofte okazas en la tria ĵaŭda posttagmezo de la monato.

## Bruselo: Esperantista Bruselo Grupo (EBG)

Instruas en Bruselo al komencantoj **Françoise Pellegrin**. Paroligaj kunvenoj gvidas **Nicolas de Buyl**. En 2024 ofte prelegis en la klubo ĝia prezidanto **Bernard-Regis Larue**, ekzemple pri kartografio. http://www.esperantobruselo.org/eo/ - https://eventaservo.org/o/EBG

EBG aperigis en 2024 tri ekzemplerojn de la revuo Esperanto Aktuala. Ĝi estas tute en Esperanto. Ĝi ĉefredaktoro estas Françoise Pellegrin. La reta arkivo de la revuo: https://sites.google.com/site/ebgaktuala



## Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o)

Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o) estas senprofitcela asocio laŭ belga juro kies celo estas propagandi la Internacian Lingvon Esperanto en la franclingva parto de Belgio. Ĝia alvokiĝo estas kunigi ĉiujn simpatiantojn kaj evidente ĉiujn Esperanto-parolantojn en Valonio. https://esperanto-wallonie.be

La membrogazeto de Valona Esperanto-asocio nomiĝas *'Espéranto en Marche'*. Ĝia ĉefredaktoro estas **Jean Annet**. La redaktadon kaj enpaĝigon prizorgas Yves Nevelsteen. Aperis en 2024 kvar revuoj. Ili estas elŝuteblaj de la retejo https://mallonge.net/EEM-arkivo.













## La estraro de V.Esp-o

**Estraro en 2024**
Prezidanto: **Jean Annet**
Sekretario: **Valère Doumont**
Kasisto: **Claude Glady**

### Lokaj grupoj de V.Esp-o

#### Esperanto en Charleroi

Ĉefaj aktivuloj: **Hubert Demeyere** kaj **Michèle Villers.** Retejo: https://esperanto.be/charleroi
En 2024, esperantistoj kunvenis en Charleroi preskaŭ ĉiusemajne en kultura centro en Mont-sur-Marchienne. La kursoj okazas ĉiun mardon: matene de la 9h ĝis la 12h. Antaŭ la

kafpaŭzo (10h30) surbaze de teksto, oni tradukas (F - E; E - F) kaj diskutas pri la gramatiko, la plej taŭgaj vortoj kaj poste pri la enhavo. La debatoj estas kelkfoje tre viglaj. La temoj varias laŭ la deziroj de ĉiu : ekz. la sano, la historio, la dombestoj, ktp.  De la 10h30 ĝis la 11h: kafpaŭzo (kafo, kukoj). Post la paŭzo estas iomete malpli serioza  ni organizas ludetojn , rakontas ŝercojn (en Esperanto kompreneble). Nia celo estas paroligi ĉiujn.

### Esperanto en Lieĝo

Prezidanto: **Freddy Close**. Kasisto kaj instruisto: **Eric Nemes**. Sekretario: **Pierre-Yves Dekerck**. Instruisto: **Eliane Pironnet**. https://esperanto.be/liege

En 2024, la grupo de Lieĝo kunvenis en du malsamaj lokoj, unufoje monate: en Méry marde posttagmeze, kaj en Lieĝo (ĉe Toutes Directions) sabate matene. Ili daŭrigis la kurson en Huy kaj komencos novan en Seraing!



### Esperanto en Louvain-la-Neuve

En Louvain-la-Neuve **Catherine Royaux** neregule organizas kunvenojn. Ĉar ŝi loĝas en universitata urbo, ofte la kunvenoj estas tre internaciaj.

# Asocioj aktivaj en Belgio

## Movado sen Nomo

Ĉefaj aktivuloj en 2024: **Ludovic Jongelingh, Mireille Storms, Nicky Janssen** kaj **Lode Van de Velde**. https://esperanto.be/msn

La 25-an de januaro 2025 estos 45 jaroj post kiam patro Phil Bosmans helpis fondi la movadon Movado sen Nomo (MsN), la Esperantan version de sia ĉefa projekto **Bond Zonder Naam**. Okaze de la 45-jariĝo de Movado sen Nomo, okazis manĝofesto (https://mallonge.net/msn-festo) en Antverpeno kaj eldoniĝis kalendaro. Pri la historio de Movado sen Nomo via povas legi en Vikipedio: https://mallonge.net/msn-viki.




## Verdaj Skoltoj: niaj junuloj

Ekde novembro 2012 la Verdaj Skoltoj skoltigas esperantistojn. **Valère Doumont sukcese kreis Esperanto-agadon por junuloj en nia regiono**.
Vidu https://verdajskoltoj.net kaj https://benelukso.eu/verdaj-skoltoj

La Verdaj Skoltoj eldonas revueton, **Renato-monato**. Kutime ĝi estas nur dissendita per retpoŝto, sed okaze de la Zamenhoffesto en Lessines, Valère pretigis kelkajn paperajn ekzemplerojn. Jen ligilo al la reta arkivo de Renato-monato: https://mallonge.net/renato24

### BEJ / FLEJA

De 1979 ĝis 2012 ekzistis **Flandra Esperantista Junulara Asocio** (FLEJA). Vi povas legi pri ĝi en Vikipedio: https://mallonge.net/fleja. Estas provoj re-fondi FLEJA-n aŭ re-krei novan asocion **Belga Esperanto-Junularo** (BEJ). Pri tio interalie okupiĝas ekde 2023 **Pjotr De Mulder** kaj aliaj aktivuloj de la Verdaj Skoltoj. BEJ ne estas tradicia grupo kun fiksa kunvenejo, nek propra programo. Ĝia celo estas kune vojaĝi kaj ĉeesti eventojn, kunvenojn kaj kursojn kiuj estas interesaj por junuloj. Vidu https://eventaservo.org/o/BEJ.

## Eldonejo Libera

Eldonejo Libera estas malgrandkvanta eldonejo fondita de **Lode Van de Velde** en 2016. La celo estas disponigi al ĉiuj verkemaj esperantistoj eblecon eldoni librojn sen eldonaj

komisionoj de ekzistantaj asocioj kaj sen investo pro altaj minimumaj eldonkvantoj. La eldonejo eldonas ĉefe librojn en Esperanto (originalajn kaj tradukitajn) kaj multlingvajn librojn. Vidu https://eldonejolibera.be kaj https://eo.wikipedia.org/wiki/Eldonejo_Libera

Eldonejo Libera fariĝos baldaŭ parto de FEL, pro tio ke Lode eklaboris ĉe FEL, por eviti konflikton de interesoj.

## BAFE - fervojistoj

Retejo: https://eventaservo.org/o/BAFE. Ĉefaj aktivuloj en 2024: **Marc Cuffez** kaj **Margaretha Symoens**. BAFE (Belga Amikaro de Fervojistaj Esperantistoj) estas la posteulo de BEFA (Belga Esperantista Fervojista Asocio). BEFA mortis kaj naskiĝis nova organizo por ke amikoj de fervojoj en Belgio povu membriĝi al la internacia organizo IFEF (**Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**). En la printempo de 2020 BAFE estis akceptita de IFEF kiel la landa asocio de Belgio. En 2024 BAFE ne havis agadon en 2024 krom:

- perado de membreco de BAFE/IFEF, kiu inkluzivas abonon al la revuo **Internacia Fervojisto** https://mallonge.net/fervojisto
- partopreno de Marc Cuffez kiel komitano de BAFE ĉe IFEF dum la kongreso en Strasburgo.

## BEMI - biciklistoj

BEMI estas la Biciklista Esperantista Movado Internacia: grupo de esperantistoj, kiuj biciklas iomete pli ofte kaj serioze ol la averaĝa internaciulo. BEMI celas aranĝi almenaŭ unu internacian biciklo-karavanon ĉiujare, sed ankaŭ servas kiel kontaktilo por tiuj biciklistaj esperantistoj, kiuj preferas solaj vojaĝi. https://bemi.tejo.org

Unu el ĉefaj aktivuloj de BEMI en Belgio estis en 2024 **Eddy Van den Bosch**.

## ILEI - instruistoj

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj estas faka asocio de esperantistaj instruistoj kaj instruantoj de Esperanto. Retejo: https://ilei.info

Belgaj komitatanoj de ILEI en 2024: **Marc Cuffez** kaj **Kristin Tytgat**.

## IESPA - arkivo

Ĉefaj aktivuloj en 2024: **Marc vanden Bempt** kaj **Roland Rotsaert**.

Internacia Esperanto-Arkivo http://www.iespa.eu/, mallonge IEspA, celas kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn kaj objektoj en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, maksimume en ilia originala formo (apud diĝitaj kopioj). Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.

Por realigi ĉi tiun celon, la asocio altiras arkivajn dokumentojn diversmaniere. Ĝi provizas medion (posedaĵon aŭ luadon) taŭgan por gardado en optimumaj kondiĉoj koncerne klimaton, sekurecon kaj simile. Detala inventaro de la arkivaj dokumentoj estas daŭre ĝisdatigata. Principe ne disponeblas pruntado, la aliro eblas surloke aŭ per aliaj vojoj, ekzemple skano.

Internacia Esperanto-Arkivo en 2024 sukcesis akiri domon en Diest. Pluraj belgaj asocioj kaj individuoj subtenis IEspA-n finance (per donacoj kaj monpruntoj) kaj per volontulado. **Ankaŭ BEF iĝis mecenato per donaco de 1000 eŭroj**. Vidu https://mallonge.net/iespa-subteno.

## TEVA - vegetaranoj

Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) estas asocio de esperantistaj vegetaranoj. Ĝi fondiĝis en 1908 kaj estas la plej malnova el la nuntempe ekzistantaj internaciaj organizoj de vegetaranoj. Vidu https://eo.wikipedia.org/wiki/TEVA

La ĉefa aktivulo de TEVA estas la belgino **Heidi Goes**. Yves Nevelsteen helpas pri la enpaĝigo de la revuo Esperantista Vegetarano kiu aperas dufoje jare. Ankaŭ en 2024 aperis du eldonoj. Eblas aboni la revuon papere kaj elektronike. Pro tempomanko, la retejo https://vegetarismo.info kaj la reta arkivo https://vegetarismo.info/arkivo-ev/ delonge ne estas aktualigitaj.

# Konkludo

Esperantistoj en nia regiono surprize multe agis en 2024! Unu el ĉefaj 'problemoj' de la nuntempa Esperantujo laŭ mi estas, ke esperantistoj mem subtaksas kiom da eventoj okazas, kaj ke oni ne sufiĉe komunikas kaj fieras pri la realigoj.

Tial tre indas verki detalan jarraporton kiu mencias ĉiujn gravajn elementojn de nia hodiaŭa agado. Per 32-paĝa raporto (!) eblas 'pruvi', ke Esperantujo en nia regiono plu vivas kaj viglas. Mi esperas, ke ĝi instigos vin agi por kaj per Esperanto, kaj ke vi **kunlaboros** ankaŭ dum venontaj jaroj, en via loka klubo, kun najbaraj asocioj, kaj internacie.







[https://esperanto.be/best](https://esperanto.be/best)

## Gebeneluksa Kongreso 2-5 oktobro 2025




[https://benelukso.eu/kongreso](https://benelukso.eu/kongreso)




[https://eventaservo.org](https://eventaservo.org)